LA SERPENTO KAJ LA KOLOMBINO

Antonio Felix da Silva (*)

Mi loĝis en malgranda vilaĝo. Mi havis dek jarojn. La malgranda vilaĝo estis proksima al la urbo Monteklaro (Montes Claros),

ŝtato Minoj, Brazilo.

En tiu regiono dum la tuta jaro la suno brilas, kaj varmegas ĉie. La arboj kaj la kreskaĵoj similas al mortantoj. Kiam pluvas, la arboj kaj la kreskaĵoj burĝonas, kaj aperas folioj, floroj kaj poste fruktoj.

Ĉiam mi promenis tra la kampoj. Mi piediris ĝis rivereto por admiri la mirindajn, malgrandajn kaj multkolorajn fiŝojn.

La riverbordo estis mirinda loko, ĉar tie staris belaj kaj grandaj arboj. La kreskaĵoj havis multkolorajn florojn kaj floretojn. Tie estis mia mondo. Tie mi revis.

Mi ankaŭ rigardadis la bestojn kaj bestetojn, la birdojn kaj birdetojn kaj la kolorajn papiliojn. Tie ankoraŭ ekzistis multege da belaj kaj bluaj floretoj, la miozotoj apud la bordoj de la rivereto.

Iam, mi sidis sur ŝtono ĉe la rivereto.
Mi rigardis la pasiflorojn, kiam mi ekvidis grandan kaj malbelan serpenton, kiu alproksimiĝis tre rapide al bela, blanka kolombino.

La blanka kolombino ektimis, kiam ĝi ekvidis la alproksimiĝantan teruran kaj malbelan serpenton.

Ĝi estas preta por ekflugi, kiam la serpento diris: Jen! Jen! Kion mi vidas? Ĉu ĝi ne estas Blanka Kolombino?

BLANKA KOLOMBINO:

Jes, sinjorino Serpento, mi estas Blanka Kolombino, tre blanka.

SERPENTO: Jes, jes, vi estas Blanka Kolombino. Dum mia tuta vivo mi serĉadis Blankan Kolombinon, kiel vin, ekde mia naskiĝo.

BLANKA KOLOMBINO: Ĉu vere , sinjorino Serpento?

SERPENTO: Jes, jes, vere, kara Blanka Kolombino! Mia plej granda revo estis renkonti Blankan Kolombinon kiel vin, vid-al-vide kiel nun.

BLANKA KOLOMBINO:
Ĉu mi rajtas scii kial, sinjorino Serpento?

SERPENTO: Jes, jes, kara Blanka Kolombino, vi scios. Mi aŭdis ion pri vi, kara Blanka Kolombino.

Iu diris al mi, ke Blanka Kolombino estas tre bongusta.

BLANKA KOLOMBINO: Ho! Mi tre malĝojas. Ĉu vi aŭdis pri mi nur tion?

SERPENTO: Ne, ne, bongusta kolombino! Mi ankaŭ aŭdis, ke vi estas freŝa, mola, kaj ke viaj ostoj estas facile digesteblaj.

BLANKA KOLOMBINO:

Ho! Kiel malfeliĉa mi estas!



SERPENTO:

Bonvolu, kara kolombino, ne ploru!

Mi neniel dolorigos al vi.

BLANKA KOLOMBINO:

Mi ne ploras tial, sinjorino Serpento.

Mi ploras, ĉar vi estas tre nescianta.

SERPENTO: Ĉu nescianta, mi? Mi ne komprenas vin.

BLANKA KOLOMBINO: Do, ĉu vi ne scias? Ĉu vi ne scias, kio okazas, kiam Serpento kiel vi manĝas Blankan Kolombinon kiel min?

SERPENTO: Ne, ne, mi ne scias. Kio okazas?

BLANKA KOLOMBINO: Kiu manĝas Blankan Kolombinon kiel min, aliformiĝos en Blankan Kolombinon kaj poste, ĝi estos ĉasaĵo kaj nutraĵo de aliaj serpentoj.

SERPENTO: Aĥĥ!!! Ĉu vere?

BLANKA KOLOMBINO:

Jes, vere, sinjorino Serpento, vere! Dio, la kreanto de Ĉio, donis al ni, la Blankaj Kolombinoj, la taskon aliformi la serpentojn en Blankajn Kolombinojn, se ili manĝas nin.

Tiamaniere, ni finas nian taskon sur la Tero.

Do, vi estos la nova blanka kolombino, tre blanka.

SERPENTO: Foriru! Mi ne deziras manĝi vin. Mi ne deziras aliformi min en blankan kolombinon kiel vi. Foriru!

Do, la terura kaj malbela serpento forlasis la lokon, serpentumis tiel rapide kiel ĝi alvenis, ĝis ĝi malaperis en arbetaĵon, dum la blanka kolombino forflugis rapide al sekura loko.

Antonio Felix da Silva (*)

(*) Vicdelegito kaj Fakdelegito de UEA (Instruado, Verkado, Em. Militisto) en la urbo Florianopolo, Sankta Katarino, Brazilo, kaj Vic-Prezidanto de Esperanto-Asocio de Florianópolis.

Bildserio farita de Liette Lêla